TRUMP-EU-RUSIO, verkita de URSO (*Éric Bernard COFFINET*) el Francio

En siaj mesaĝoj plejparto de esperantistoj oponas militon en Ukrainio sed denuncas nur kulpojn de Rusio, ĉar laù mia oponio multaj el ili estas mez- aŭ orientaj eŭropanoj, kiuj multe kaj daŭre suferis sub la bolŝevista jugo. Ili sopiris pri libereco, homrajtoj, justeco kaj riĉeco en la okcidenta "paradizo". Sed ĝi estas nur iluzio...

En ĝi riĉecon ne posedas simpla civitano sed akaparas la internaciaj firmaoj kaj bankoj. Justecon ĝuas nur potenculoj. Homrajtoj dependas de kiu vi estas kaj de kie vi vivas. Vi estas "liberaj" pensi, paroli kaj agi, sed nur konforme al la decido de la regantoj : oni diversmaniere subpremas vin se vi oponas imperiismajn militojn de Usono en Ukrainio kaj en Mez-Oriento, se vi denuncas krimojn de la israela Ŝtato en Palestino kaj en Lebano, se vi ribelas kontraŭ laŭleĝa mortigo de fetoj, malsanuloj kaj maljunuloj, se vi ne akceptas "Ŭokismon" kaj manifestas vian religion, se vi ne konsentas injektojn de malutilaj vakcinoj, se vi protestas en Francio, en Anglio kaj en Kanado kontraŭ politiko ekonomia, kiu kvazaŭ sklavigas pere de monŝuldoj artefaritaj kaj de fantazioj ekologiaj ! En tiuj novliberalismaj kaj capitalismaj socioj okcidentaj oni malrespekte forĵetas vin kiam vi ne plu utilas kaj krome oni diras ke nur vi kulpas pri tio en tiu "Brava Nova Mondo"...

Donald TRUMP fariĝas la 47a Prezidento de Usono kun la slogano MAGA (*Make Amerika Great Again* = Faru Usonon Denove Granda). Li volas daŭre malfortigi Eŭropan Union kaj Ĉinion, kiujn li konsideras kiel la plej gravajn konkurencojn de Usono. Li ne plu volas pagi por milito en Ukrainio kaj lasos la ŝuldon al eŭropanoj. Mi ankaŭ konsentas politikon MAGA se tio signifas "*Make America Go Away*" (Forigu Usonon... El Eŭropo). Eŭropanoj regu Eŭropon sen Usono kaj reamikiĝu kun Rusio !

Laŭ mia opinio, milita invado de rusoj al Eŭropa Unio estas fabelo por malebligi tiun reamikiĝon. Unue ĉar grave mankas homoj en Rusio : 145.000.000 rusoj ne sufiĉos kontraŭ 450.000.000 eŭropanoj. Due ĉar, kiel kantis STING, "ankaŭ la rusoj amas siajn gefilojn". Kaj trie ĉar militojn inter rusoj kaj aliaj eŭropanoj historie okazigis ne la rusoj sed ja aliaj eŭropanoj : ordenanoj de Livonio en la 13a jarcento, svedoj en la 18a jarcento, francoj dufoje (1812 kaj 1854) en la 19a jarcento, germanoj dufoje (1914 kaj 1941) en la 20a jarcento kaj anglo-usonanoj pere de ukrainanoj en la 21a jarcento. Estonteco de Eŭropo nepre estos kun Rusio, kiel antaŭvidis la eksprezidento franca *Charles DE GAULLE* (1890-1970), kiu sukcese postulis forigon de la usonaj militistoj el Francio en 1967 !